

esperantoUSA

The ELNA

Newsletter: News of the Language Problem and Esperanto as the solution

1991(7)

Making News This Issue

Speaking of Junk Food...

Doug Portmann, co-author of the *Biblioteka Terminaro* and author of several earlier articles on technical terms in Esperanto, introduces us to the Esperanto equivalents of some junk-food terms.

See Page 7

Old Faithful

This year's annual conference of the Intermountain Esperanto Group took place against the magnificent background of Yellowstone National Park. Edveno Grobe describes that conference in this issue.

See Page 8

Technicalities

Keeping track of technical terms in Esperanto is a full-time job for Rüdiger Eichholz, Director of the Academy of Esperanto Section for Technical Dictionaries.

See Page 9

In This Issue:

Northwest by Midwest 5

Lots of Letters 10

Children's Books and Chinese Poetry 13

And Much, Much More to
Delight and Inform You!

Forty Years of ELNA

The Founders

In 1992 we wish to honor...

THE NORTH AMERICAN ESPERANTO REORGANIZATION COMMITTEE (1951-1952)

Howard E. Latham
Elwyn C. Pollock
James D. Sayers
Glenn Turner

THE DRAFTERS OF THE ORIGINAL ELNA CONSTITUTION

(June 29, 1952)

Ferd R. Carlson
Mrs. J. E. Carpenter
Minnie R. Demrick
Gilbert Nickel
Cecelia P. Thomas
Helene Wolff
Dittlof Zetterlund
Elvira Zetterlund

ELNA'S FIRST EXECUTIVE BOARD (1952-1953)

Gilbert D. Nickel (President)
John L. Lewine (Vice-President)
Louis Dormont (Secretary)
Howard E. Latham (Treasurer)

William G. Adams
John Bovit
Ferd R. Carlson
Armin F. Doneis
George G. Iggers
Robert Karlson
David B. Richardson
Kenneth Tompkins
Helene Wolff
Elvira Zetterlund

THE FIRST EDITOR OF THE NORTH AMERICAN ESPERANTO REVIEW (today *Esperanto U.S.A.*)

James D. Sayers

EDITORIAL

MODSTAND, FERNSPRECHEN KAJ FLANO

En la jaro 1959 oni elektis min kiel intersanĝstudenton por la Interlerneja Programo de la "American Field Service", kaj sendis min al Danlando. Pri Danlando mi diros nur, ke ĝi estas belega lando, kvietaj lando, komforta lando, lando de la plej bonaj manĝaĵoj en la mondo (kiu tiel malbonŝancis, ke li/ŝi neniam manĝis *rødgrød med fløde på*? kiu tiel bonŝancis, ke li/ŝi neniam devis provi elparoli tiun nomon?), kaj lando kie la unuan fojon en mia vivo mi renkontis aliajn esperantistojn.

Ĝi estas ankaŭ la lando, kie mi renkontis *modstand*.

Komprenu, ke mi devis studi en danlingva lernejo (surprize, anglalingvaj lernejoj tre maloftas en Danlando; oni preferas studi en tiu fremda lingvo, la dana), kaj tial devis lerni el danlingvaj libroj. En mia kurso de fiziko, la unuan fojon malferminte la kurslibron, mi komencis legi frazon kaj tuj trafis tiun malhelpan vorton *modstand*.

Mi tiutempe estis tute flavbeka esperantisto; alie min estus helpinta miaj scioj pri la strukturo de nia lingvo. Ĉar *modstand* estis dana vorto konstruita tute laŭ la samaj principoj, kiuj gvidas la vortkunmetadon en Esperanto: *mod* = kontraŭ, *stand* = staro, *modstand* = kontraŭstaro. Aŭ, se paroli teknike, *modstand* = rezistanco.

Mia unua reago estis: Kial, diable, oni ne uzis vorton el la internacia greklatina teknika vortprovizo? Kial ne *resistanset* (la rezistanco), tial ke mi tuj povu kompreni?

Nur poste mi ekkomprenis, ke oni verkis la libron ne por mi, vizitanta usonano, sed por danaj studentoj, kiuj tuj komprenas, ke *at modstande* signifas kontraŭstari, kaj do *modstand* signifas kontraŭstaro, sed por kiuj *at resiste* havus nenian sencon, kaj sekve ne *resistans*.

Ni ofte supozas, ke la dialektiko inter insistantoj pri la uzado de la internaj latentaj de Esperanto, unuflanke, kaj subtenantoj de la internacia latin-grek-angla teknika vortprovizo, aliflanke, estas tute interna afero, kaj ke la latentemuloj malsukcesonte batalas kontraŭ ne-rezistebla (nekontraŭstarebla?) tajdo, kiu jam sukcesis venki ĉiujn aliajn landojn de la mondo. Sed tiu batalo fakte estas

decidita en preskaŭ neniuj lingvo.

Mi memoras, ke mi diversfoje legis satirajn kritikojn de la germanoj, ĉar ili rifuzas rezigni pri siaj jam delonge eksmodaj teknikaj vortoj *fernsprechen* (forparoli) kaj *fernschreiben* (forskribi) favore al la internaciaj *telefon* kaj *teletip* (en la germana, eble *telefonieren* kaj *teletipieren*?). Nu, mi lastatempe aŭdis, ke la radiko *telefon* pli-malpli venkis—en la regiono de Frankfurt, kie jam delonge fortas la premo de usonaj lingvo kaj kulturo pro la centmiloj da soldatoj, kiuj postenas tie. Sed, laŭ la sama fonto, se oni vizitas vilaĝojn sufiĉe ekster tiu influregionon, oni ankoraŭ aŭdas la radikon *fernsprech*, kaj tio preskaŭ unike.

Kial oni ankoraŭ luktas kontraŭ "nia" internacia vortprovizo? Kial eĉ esperantistoj foje kontraŭstaras (rezistas) ĝin?

Mi povas elpensi du kialojn.

Unue: kial rezigni pri la superecaj punktoj de nia lingvo nur por turni nin al precize la samaj punktoj en iu alia, jam efektive mortinta, lingvo? Fakte, granda parto de la "latin-grek-angla" vortprovizo estas grekdevena. Kial? Ĝuste pro tio, ke la antikva greka lingvo estis multe pli aglutina ol la nunaj angla kaj franca lingvoj, kaj anglaj-francaj sciencistoj povis pli facile konstrui novajn "teknikajn" vortojn el tiu lingvo ol el la propraj, kies aglutineblecoj preskaŭ ne ekzistas. Tiel nia "anglalingva" vorto *telephone* estas kombinaĵo de greka radiko kun greka prefikso. Kial la esperantistoj (aŭ la danoj, aŭ la germanoj, aŭ la ĉinoj) pruntu el la angla lingvo vortojn fakte grekdevenajn, kiam ili mem povas krei la samajn vortojn en la propra lingvo?

Kio kondukas min al la dua punkto: semantika enhavo.

Supozu, ke vi estas juna studento en, ni diru, Germanio, kaj vi neniam antaŭe renkontis la teknikan terminon *telefonieren*. Nun vi trafas ĝin en via lernolibro. Jen, vi konas novan vorton! Nu, eble ne "konas"—ĉar vi tute ne scias, kio estas ĝia signifo! Vi devos aparte lerni tion! Aliflanke, la vorto *fernsprechen* estas kreita el du fundamentaj vortoj, kiujn vi certe jam konas; do vi povas unuavide scii, kion ĝi signifas! Tio eble ne estas granda avantaĝo por la sesdekjara

sciencisto, kiu jam dediĉis milojn da horoj al konatiĝo kun la "internacia" terminaro—sed por junulo studenta el germanlingva (eventuale Esperantlingva) lernolibro, ĝi povas esti tre tempoŝpara. Ĝi povus esti eĉ decidiga: ĉu triamonda studento uzu Esperanton aŭ la anglan por studi sciencajn temojn, se tiu devas dediĉi precize la saman tempegon por lerni la "specialan" vortprovizon en ambaŭ lingvoj?

Pensu momenton pri unu ekzemplo, kiun mi pruntas de Claude Piron. La "internaciistoj" insistas pri la graveco kaj utileco por specialistoj de la teknika medicina termino "miokardia infarkto". Eble ili pravas. Sed por mi, ordinarulo, ĝi signifas absolute nenion, eĉ en sia anglalingva enkarnejo. Nu, Piron proponas la tute Esperantecan "kormuskola tuboŝtopo". Hej! Jen mi tuj komprenas, pri kio temas! (Sed jen granda problemulo por la "specialistoj": se ili uzos terminojn, kiujn povos kompreni ĉiuj, nu, eble oni ekkonscios, ke ili mem ne scias, pri kio ili parolas...)

Reginald Jaderstrom tuŝis la saman problemon, kiam li parolis, ĉe la ĉijara Tut-Kalifornia Esperanto-Konferenco, pri la bezono uzi nacilingvajn terminojn en, ni diru, meksikia restoracio. Ĉu oni diru "Mi volas mendi unu *burrito*, du *enchiladas*, kaj unu *taco*"? Ĉu fakte oni enkonduku tri novajn neologismojn, per "Mi volas mendi unu buredon, du enĉiledojn, kaj unu takon"?

Respondon oni povas eble trovi en la ĉimonata artikolo de Doug Portmann. Doug diskutas kvar Fundamentajn vortojn pri manĝaĵoj en Esperanto. Unu el tiuj vortoj estas "flano". Ŝajnas al mi, ke oni povas fakte diri, uzante tiun jam centjaran radikon: "Mi volas mendi unu flandvolvaĵon, du flandulaĵojn, kaj unu flandfaldajon."

Certe, al tiuj vortoj mankas la ekzotika allogo de *burrito*, *enchilada* kaj *taco*; sed se vi estas sufiĉe malsatega, eble tio ne gravos al vi. Cetere, de la Esperanto-vortoj, ĉu vi ne povas bildigi por vi, kiel diferencas inter si tiuj tri gravaj nordmeksikaj manĝaĵoj? Des pli se vi neniam antaŭe renkontis ilin?

Don Harlow

NEWSBRIEFS

Esperanto in the Media

Prof. Jonathan Pool's article "The World Language Problem" in the magazine *Rationality and Society* (January, 1991) develops a simple model of artificial-language evolution in a simplified world society. Prof. Pool's analysis is aimed at determining the stability or instability of the results of such evolution. Prof. Pool, a member of ELNA's Board of Directors, mentions Esperanto several times in the course of the article. (offprint provided by Jonathan Pool)

Mark Fettes, editor of the magazine *esperanto*, is the author of an article "Europe's Babylon: Towards a Single European Language?" which appeared in the magazine *History of European Ideas* (Vol. 13 No. 3, pp. 201-213, 1991). The article compares the current situations and future prospects of English and Esperanto. Fettes concludes by suggesting that "the balance of a single European language will tip away from acceptance of the hazards of history towards a language embodying the human capacity for creation, choice and freedom." It is not hard to guess what language he's talking about. The original article is available as an offprint (0191-6599/91) for \$3.00 from Pergamon Press; an Esperanto version is available as an Esperanto Document from UEA or ELNA. (sent by Mark Fettes)

A six-frame comic-strip "Hector" in the Boulder, CO, magazine *boING-boING* (1991/6) describes the history of the rise and fall of Volapük, and concludes: "Despite also being fractured into innumerable other languages (Ido, Esperema, Panskrit, Lips-Kith, Oiropapitschn, Quji, Astegona-graphianek, Clarison, Geoglot, Esk, etc.) [Esperanto] is still around today and may yet become la lingvo favorata por tuta la mondo."

KP Wire, newsletter of the Bay Area (CA) Kaiser Permanente medical system (July 29, 1991), reports that Mark C. Stephens of Regional Industrial Engineering was elected to the national board of directors of the Esperanto League for North America. (sent by Mark Stephens)

Former ELNA Board member Ellen Eddy is represented in the "Readers' Forum" of the Contra Costa, CA, *Times* (August 2, 1991) with a three-column letter titled "New world order needs new world

language." Ms. Eddy contrasts the UK in Bergen with the recent Bush-Gorbachev summit in Moscow, tells something about Esperanto and its facility, and concludes: "You don't have to be a Bush or a Gorbachev to bring better understanding to the world. Using Esperanto can be your key to unlocking the door to peace." (sent by Ellen Eddy)

Theodore Brown of Storrs, CT, in the Hartford, CT, *Courant* (August 9, 1991), responds to *The Courant's* July 23 editorial about University of Hartford President Humphrey Tonkin and Esperanto. Brown comments on Esperanto in Eastern Europe and on the "simple, logical structure of Esperanto" which "makes language-learning as much fun as Tinker Toys." He also points out that those who have learned Esperanto "will find that they have learned a tool for making friends worldwide." (sent by Humphrey Tonkin)

An article about WSU student Julie Kerr in the *Idahonian* and *The Daily News* (Aug. 24, 1991) describes her spring-semester stay in Budapest, Hungary, while studying mathematics at Eötvös Loránd Technical University. The article made a special point of mentioning that Kerr lived with a Hungarian family and that "Ivan and Judit Bujdosó were especially suitable hosts for Julie since all three speak Esperanto ... a special interest of Kerr's for five years." (sent by Arlyn Kerr)

"Esperanto aficionados enjoy attending classes close to home at University," reports the University of Hartford, CT, *Observer* (Aug. 29, 1991) in a description of the August summer Esperanto workshops at the University. The article quotes from University President and long-time Esperantist Humphrey Tonkin, students Donner Lohnes, David Wolff and Grace Cali, and instructors William F. Orr and John C. Wells. The same issue also reports Humphrey Tonkin's election as president of the Esperantic Studies Foundation of Washington, D.C., which "works to dissolve language barriers and conducts, disseminates and promotes research on international language problems and solutions." (sent by Humphrey Tonkin and David Wolff)

In a *Smithsonian* article "Alaskans Visit

Petropavlovsk in Siberia" (August, 1991), the author mentions that part of the official schedule for Tuesday, April 16, was "a meeting with an Esperanto group" in the Siberian City. (sent by Arlyn Kerr)

A review in the Washington, DC, *Post* (date unknown) of the film *Bill & Ted's Bogus Journey* referred to the two main characters as speaking the "universal Esperanto of the young." A most non-non-heinous observation, dudes! Station! (reported by Pilar Solis in *La Potomaka Esperantisto*, Aug. 1991)

The Esperanto activities and publications of the Socialist Labor Party are outlined very briefly on pages 93-95 of *The Socialist Labor Party, 1876-1991: A Short History* by Frank Girard and Esperantist Ben Perry. (reported by Ralph Dumain in *La Potomaka Esperantisto*, Aug. 1991)

Jeff Kaczmarczyk, Correspondent for the Kalamazoo, MI, *Gazette* (Sep. 8, 1991), gives a very positive view of Esperanto in "Esperanto can bridge barriers of language" in the "Lifestyles" section. Kaczmarczyk bases his article on interviews garnered during the Fourth Midwest Esperanto Conference at Western Michigan University in July. Interviewees, include John Starling, ELNA Board member Sherry Wells, Steve Brewer, and Marcee Ann Schwenter. A companion article by Kaczmarczyk, "More than a language, it eases international tensions through neutrality," gives a good overview of Esperanto's history and current situation. (provided by the ELNA C.O.)

On pp. 162-163 of *Disappearing Thryough the Skylight: Culture & Technology in the Twentieth Century*, O. B. Hardison, Jr., discusses Esperanto as a "transparent" language, unlike most ethnic tongues, but then dismisses it on the Whorfian grounds that it is overly Indo-European. Hardison largely bases his argument on one atypical example of Esperanto, the famous (?) *Inteligenta persono lernas la internacian lingvon...* and one descriptive line, also aimed specifically at English-speakers, from the first lesson of the postal course. (sent by George Partlow)

The IBM document *ABOUT TYPE: IBM's Samples of Core Interchange Digitized Type, G544-3710-01*, in its section on Latin2/3/5 typefaces, includes examples of use in Esperanto for each typeface. Note: these typefaces are intended for use with Print Services Facility licensed programs for the MVS, VM and VSE operating systems and not for ordinary MS-DOS machines. (provided by Bill Harmon)



REGIONAJ KAJ FAKAJ RAPORTOJ

ARIZONA

La 13an de aŭgusto dum 20 minutoj, Mary Lindeman instruis Esperanto-lectionon al dek okjaruloj en la Montessori-Lernejo de Tempe, aprobe de lernejestro Irma Letson. La Montessorifanoj estis bone pretiĝintaj por la leciono de Mary, ĉar ili jam lernadis la germanan en la lernejo. Kiam Mary instruis al ili la vorton "Dankon", ili ekscitite respondis: "Ni jam konas tiun. Ĝi similas la germanan." Tra la tuta sperto Mary sentis grandan surprizon pro la entuziasmo kaj lernorapideco de la lernantoj, ankaŭ pro tio, ke ili ŝajne komprenis sen malfacilaĵoj la tutmondan kaj pacaman filozofion de Esperanto. (laŭ *Arizona Stelo*, oktobro, 1991)

ARKANSAS

En julio-aŭgusto Roan Orloff Stone vizitis Audran Anderson en la urbo Marshall. Neniu tie iam aŭdis pri Esperanto, kvankam s-ino Anderson donacis Esperanto-libron al la publika biblioteko. S-ino Stone kontaktis la publikan bibliotekon, la semajnan ĵurnalon, kaj unu el la du radio-stacioj. Ĉie ŝi lasis kvanton da broŝuroj. (raportis Roan O. Stone)

CALIFORNIA

La 27an de aŭgusto komenciĝis ĉe Universitato de Kalifornio (Berkeley) nova semestro, kun refojaj Esperanto-kursoj. La kursoj estas instruataj de Prof. Ĉien Mingĉi (LMe 4-5.30 pm) kaj s-ro Charles Galvin (LMe 7:30-9 pm). Por reklami la kurson, dimanĉe la 25an de aŭgusto sep fervoraj (ĉu fanatikaj?) gesamideanoj el la Gofa Regiono pasigis preskaŭ tutan posttagmezon sur la stratoj de Berkeley, disdonante flugfoliojn pri la kursoj. Oni ne nur donis la foliojn (faritajn de Charles Galvin), sed ankaŭ respondis tiajn demandojn: "Are you still around, guys?" kaj "Is Esperanto still alive???" (laŭ raporto en *La Orient-Ekspreso*, septembro 1991)

En septembro, samideano Doi Hirokaz, delegito de UEA en Jokohamo,

Japanio, vizitis la esperantistojn en San Diego. Lin gastigis Bill Schwartz kaj Frank kaj Gloria Helmuth. S-ano Doi redaktas la elegantan informbultenon *Novajoj Tamtamas*, eldonata de la loka klubo en Jokohamo sed tutmonde konata. (el la bulteno de la Esperanto-Klubo de San Diego)

La 5an de oktobro kvin esperantistoj el la Ligo de Orient-Golfaj Esperantistoj ekspoziciis okaze de la Karnavalo apud la Golfo en la urbo Richmond. Kelkaj dekoj da homoj haltis ĉe la stando kaj petis informon pri Esperanto. Partoprenis Ĉien Mingĉi, Don Harlow, Maya Kennedy, Cynthia Libby kaj Ionel Onet.

ILLINOIS

Septembromeze de 1991 dek lernantoj el la 4a, 5a kaj 6a jaroj de la Louisa May Alcott publika lernejo en Chicago ekstudis Esperanton. La grupo kunsidas 20 minutojn je la tagmezo, tri fojojn en la semajno. Tiu kurso rezultis el preparoj faritaj pli frue en la jaro, komence je ĝia rekomendo fare de s-ro David Oliver de la Publikaj Lernejoj de Chicago. Printempe, s-ro Seymour Rabens, lernejestro, kaj du instruistoj partoprenis orientigan sesion. Poste oni faris prezenton al la loka lerneja konsilantaro. Je tiu kunveno s-ro Rabens rimarkigis la popularan deziron por lingvoinstruado, sed la nekpraktikeblecon de ekz. la franca pro la necese longa daŭro de instruado. Du aliaj instruistoj partoprenis la trisemajnan kursaron ĉe SFŜU. (raportita de R. Kent Jones en *Saluton*, septembro 1991)

Kent Jones kaj Tony Gravagno deĵoris dum la pliparto de la Internacia Konferenco de Gemelurba Internacio, kiu okazis en la Hotelo Palmer House, Chicago, dum la semajno de la 15a de julio (pli-malpli 3000 ĉeestantoj). Aliaj partoprenantoj-helpanoj estis d-ro Gertrude Novak, Joe Perry kaj Bern Wheel. Multaj homoj lasis siajn nomojn kaj adresojn, esperante ricevi pli da informoj pri Esperanto. (raportis Bern Wheel en *Saluton*, septembro 1991)

TEXAS

La 24an de septembro Roan Orloff Stone prelegis pri Esperanto al la lunĉkunveno de la klubo Kiwanis en Kilgore. Ĉeestis 15 gesinjoroj. Okazis samtempe eta ekspozicio pri kelkaj Esperanto-libroj kaj pluraj korespondaĵoj al s-ino Stone. Ĉiuj atente aŭskultis dum ŝi priparolis la kortuŝan epizodon pri la vivo de d-ro Zamenhof kaj lia vivdaŭra dediĉo al Esperanto. Pluraj el la ĉeestantoj plurfoje dankis al ŝi pro la ege interesa prelego. La prelego okazis pro la klopodoj de s-ino Candice Bowers, Kilgore-ano, kiu eksciis pri Esperanto de s-ro Karlo Donoghue okaze de bahaa pilgrimo al la Sankta Lando. (raportis Roan O. Stone)

WASHINGTON

La 21an de septembro 32 ĉeestantoj kunvenis en la hotelo "Holiday Inn" en Issaquah por la Nord-Okcidenta Regiona Esperanto-Konferenco. Plena raporto verkita de Myra Larsen troviĝas sur paĝo 5.

WYOMING

La 6-8an de septembro, en Flavaŝtono-Naciparko, en ŝtato Vajomingo, okazis 1991-a kunveno-konferenco de Esperanto-Grupo Intermontara (E. G. I.). Ĉeestis ĝin geesperantistoj el ŝtatoj Arizono, Kalifornio, Nebrasko, Nov-Meksikio kaj Vajomingo. Plena raporto verkita de Edveno Grobe troviĝas aliloke en ĉi tiu numero.

GEJOJ

La 30an de junio okazis la ĝis nun plej sukcesa partopreno en la Geja Parado de San Francisko, Kalifornio. Membrojn de LSG akompanis studentoj de la Somera Esperanto-Kursaro de SFŜU kaj membroj de la SAT-ana Grupo de Sapporo, Japanio, kiuj ankaŭ portis sian propran flagon. Multaj partoprenantoj iris laŭ la stratoflankoj disdonante al la homamaso informilojn pri Esperanto, LSG, kaj la geĝigita perpoŝta kurso. (el *La Burgonigilo*, Julio, 1991)

NOREK 1991

de Myra Larsen

Varma bonveno atendis 32 ĉeestantojn de NOREK (Nord-Okcidenta Regiona Esperanto-Konferenco) kiu okazis en hotelo "Holiday Inn" en Issaquah, Vaŝingtonio, la 21an de septembro, 1991. Plena tago da informoj kaj distraj prelegoj kaj raportoj interesigis samideanojn kiuj alvenis el kelkaj regionaj hejmurboj.

El pli malproksima loko en Kalifornio venis Cathy Schulze, konata funkciulo de San Francisko Ŝtat-Universitataj someraj Esperantaj kursoj. Iu alia speciala estis Alice Maier el Insulo Galiano, Brita Kolombio. Alice ĉiam pretas paroli pri sia renkonto kun d-ro Zamenhof ĉe Boulogne-sur-Mer. Tiu okazo ankoraŭ estas elstara memoro de ŝia 102-jara vivo.

Per diapozitivoj kaj sprita parolado, Ŝahin kaj John McKinnie portis NOREK-anojn al Universala Esperanto-Kongreso en Bergen kaj postkongresa vojaĝo en amika eŭropa Esperantujo. Sammaniere, Bertl Werny kaj Greg Posick kondukis siajn aŭskultantojn al Popolfesto en Bulgario. Ĉi tiuj du dancistoj raportis varman Esperantistan gastigecon en tiu lando. Bertl diris, ke ŝi antaŭe kredis je 100 procentoj pri Esperanto, sed nun ŝi kredas je 500 procentoj!

Kaj edukadaj kaj distraj estis la prelegoj de Bob Simmonds kaj Sidney Culbert, kiuj gajnis ridadon kaj aplaŭdon.

Pri ELNA kongreso en Raleigh, Norda Karolino, informis Cathy Schulze. La aventuroj de "Neĝbirdoj" en Kostariko estis la temo de parolado de Dori Vallon Wheeler.

La grupo faris rezolucion pli bone reklami Esperanton loke, kaj diskutis rimedojn: anonci kunvenojn en ĵurnaloj, peti, ke bibliotekoj aĉetu pli da libroj, kaj tiel plu.

Inter prelegoj ĉiuj partoprenis skeĉojn, ludojn, kaj kantadon. Ekskursetoj, bankedo, kaj tagfina festo kun popoldancado kompletigis bone planitan, ĝueblan kunvenon.

MIDWEST CONFERENCE

by Karen Green

The fourth annual Midwest Esperanto Conference was held July 12-13 at Western Michigan University in Kalamazoo. The event, hosted by the Esperanto Society of Michigan, was organized by Steve Brewer and Sheri Wells.

Brewer met out-of-town participants at an informal session from 6-9 pm Friday in the Student Union.

The conference officially began Saturday morning with Sheri Wells presenting a brief crash course in Esperanto for visitors new to the language, followed by introductions of the approximately 20 participants, in Esperanto.

Brewer led a discussion about Esperanto hobbies which included an enthusiastic exchange about computer bulletin boards with Esperanto mailboxes.

Lunch was followed by a talk titled "Double Visions" by Eric Sandhusen, Midwest Regional Director of the World Federalist Association. He emphasized the common international goals of his organization and those of Esperantists, and encouraged us to consider working together.

The afternoon program included reports on what local Esperanto groups are doing to increase membership and participation in community events; how to step up publicity and increase awareness of Esperanto and how to get people more involved in national and international events.

The session closed with an abridged rendition of "Jen Nia Mondo".

—from *Saluton*, September 1991



PASOJ

† PARK †

Forpasis longtempa ELNA-ano Zelma Park de San Diego, CA, je aĝo 107-jara.

★ NOVAK ★

D-rino Gertrude M. Novak revenis de tutmonata vizito en Nepalo. Inter aliaj agadoj, ŝi instruis dek Esperanto-lecionojn al proksimume 50 gejunuloj tie. (el *Saluton*, septembro 1991)

† THOMSON †

On October 30, 1991, Ken Thomson of Pasadena, Texas, died of complications resulting from cancer, in Tryon, North Carolina, at the home and under the care of his good friend and companion, Virginia Perrenod.

Ken was born en Seguin, Texas, on December 9, 1938, but moved at an early age to Pasadena, Texas, where he kept his home for the remainder of his life. He was a graduate in physics of the University of Houston, a member of the physics honor society, and held memberships in numerous scientific and cultural societies. As owner and operator of his own business, Diversitronics, he designed and integrated computer and auxiliary systems.

Ken's interests were varied, including linguistics, astronomy, philosophy, art and music. He spoke or read nine languages, some fluently. He was also a licensed ham operator.


Ken was a former President of the Esperanto League for North America and a member of Universala Esperanto-Asocio. He was also a charter member and former president of the Houston Astronomical Society, a co-founder of the Gulf Coast Narcolepsy Association and its past vice-president, and a member of MENSA.

Virginia Perrenod

Semajno de Internacia Amikeco okazos en 1992 inter la 23a kaj la 29a de februaro. Aferoj fareblaj kaj fendaj dum tiu semajno:

- (1) Sendu poŝtkartojn aŭ leterojn al viaj alilandaj geamikoj, menciante la Semajnon;
- (2) Atentigu pri la okazo de la Semajno per letero al via loka ĵurnalo aŭ en aliaj societoj, en kiuj vi membras;
- (3) Provu aranĝi, ke via loka urbestra aŭ provincesta instanco proklamu tiun Semajnon speciala semajno en la vivo de la urbo respektive provinco.

Respondeca organizo pri la semajno estas: Internacia Societo de Amikeco kaj Bonvolo, P.O. Box 2637, GASTONIA NC 28053-2637, Usono.



ANONCOJ

[La rubriko Anoncoj enhavas diversajn reklametojn, petojn, ktp., kiuj estas diskonigindaj sed ne povas trovi lokon en alia rubriko. Nek ELNA nek la redaktoro povas promesi aŭ prirespondeci definitivan plenumon de io ajn promesita en anonco.]

En Litovio firmao "LEDI" povas por vi organizi inviton, loĝadon, ripozon en naturo, manĝadon, ekskursojn, interpretistojn, lui aŭton, serĉi diversajn kontaktojn (ankaŭ komercajn), aĉeti biletojn ktp. Por informoj kaj kondiĉoj, bonvolu direkti vin (en Esperanto) al: Stasys Kruzinauskas, Birutes 4-31, 234270 VILKAISKIS, Litovio, telefono (01242) 52989, telefakso (007 0122) 226100, telekso 261128 PLV SU.

Lastatempe aperis en Eŭskio nova kultura revuo, *Eŭska Kverko*, kiu estas eldonata de la Eŭska Esperanto-Asocio kaj kiu celas diskonigadon de la eŭska realo el pluraj vidpunktoj. Oni planas aperigi la revuon kvarfoje en la jaro. Por kvar sinsekvaj numeroj, oni sendu (prefere per bankbileto[j], ne per bankĉeko) \$10 al: Grupo Esperantista, Barrenkale Barrena 7-1ª, E-48005 BILBAO, Hispanio.

Haveblas ampleksa kolekto de malnovaj numeroj de *Scienca Revuo*. Por pli da informoj kaj por listo de haveblaj numeroj, kaj por informoj pri la Internacia Scienca Asocio Esperantista, skribu al: Rudi Hauger, Ringstr. 13, CH-8172 NIEDERGLATT, Svislando.

De la 11a ĝis la 13a de aprilo, 1992, okazos en Sacramento, CA, la Tut-Kalifornia Esperanto-Konferenco. La temo de la Konferenco estos: "Strategioj por la Esperantigo de la Mondo." Oni esperas okazigi la Konferencon, same kiel tiun de 1988, en halo en la ŝtata Ministerio pri Edukado. Por informoj: Esperanto Society of Sacramento, P.O. Box 60860 Mathews, Sacramento, CA 95860.

En 1988 oni kreis "SudFrancian PerKorespondan [Esperanto-]Kursion" kiel regionan instruilon; sed ĝi rapide fariĝis internacia, kun kelkcent studentoj en diversaj afrikaj landoj. Por povi sendi la kurson al homojn en Afriko oni nun kolektas poŝmarkojn; vendo de 100 pm

ebligas sendon de kvar senpagaj lecionoj. Ankaŭ vi povas kontribui, sendante poŝmarkojn al: Esperanto-Kurso c/o Cayzac, B.P. 7073, F-34080 MONTPELLIER, Francio.

Tiuj samideanoj, kiuj deziras studi Spiritismon per korespondado aŭ kiuj intencas traduki tiujn broŝurojn nacilingve, povos sin turni rekte al la estro de la projekto VEK: Alexandre Diogenes, Cx. Postal 52800, 60151-FORTALEZA (CE), Brazilo.

UEA denove invitas verkemajn esperantistojn partopreni en la Belartaj Konkursoj, kies kadro ĉifoj estas aparte loga; ja la rezultoj estos anoncitaj en Vieno, unu el la mondaj ĉefurboj de kulturo kaj arto. La konkurso konsistas el sep tradiciaj branĉoj (poezio, prozo, teatraĵo, eseo, kanto, fotografio, infanlibro de la jaro) kaj, eksperimente por la dua fojo, el vidbenda branĉo. En la plimultaj branĉoj, la unua premio estos 360 gld. (proks. \$200); Premio Nova Talento estos 252 gld. (proks. \$140); premio por la Infanlibro de la Jaro estos 756 gld. (proks. \$400). Limdato estas la 31a de marto 1992. Detala regularo haveblas kontraŭ unu respondkuponon de: Belartaj Konkursoj de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ ROTTERDAM, Nederlando.

Joachim Werdin, kiu lastatempe helpis starigi novajn Esperanto-organizaĵojn en Azio, kaj kiu estos unu el la instruistoj de la venontjara Somerkursaro ĉe San Francisco State, serĉas subtenadon, ĉefe financan, por plua agado en Azio. Se vi volas kunlabori, se vi havas proponojn, demandojn, aŭ ion alian, bonvolu skribi al li, kunsendante Internacian Respondkuponon, ĉe: Joachim Werdin, Pionierów 6 A 9, PL-47-220 KEDZIERZYN, Pollando.

Memore al Prof. d-ro Ivo Lapenna (1909-1987), "Fondaĵo Ivo Lapenna" starigis Stipendion Ivo Lapenna. La Stipendio konsistas el subvenciado al kiel eble plej multaj disertacioj je universitata nivelo, kiuj temas pri esperantologio kaj/aŭ pri Esperanto en rilato kun interlingvistiko. La unuan fojon la Stipendio estos aljuĝita en 1992 por disertacioj oficiale akceptitaj de universitata instanco en la jaroj 1990 kaj 1991. Tempolimo por

la transsendo de la faklaboraĵo en du ekzempleroj estas fino de februaro 1992. Adreso: D-ro Klaus Perko, Lendkai 111, A-8020 GRAZ, Aŭstrio. Aŭtoroj dezirantaj kandidatiĝi al la Stipendio bv. peti detalan regularon de: S-ro Peter Zacho, Nørregårdsvej 91, DK-2610 RØDOVRE, Danlando.

Asocio Esperantista de Rio de Janeiro kunlabore kun Alagoana Asocio de Esperanto, kun apogo de Brazila Esperanto-Ligo, preparas grandan ekspozicion por montri la utilecon de Esperanto al partoprenantoj de la UN-Konferenco pri Mediprotektado ECO-92, okazonta 1-12 junio, 1992. Kiuj volas sendi saluton al la organizantoj de la Konferenco, skribu al: CNUMAD-92, SAIN L4 Norte ed. sede do IBAMA, bl. A 1ª piso, s/19, BR-70000 BRASILIA (DF), Brazilo; kiuj volas kunlabori je la esperantista flanko, skribu al: AERJ/UTINESPO, Rua Senador Dantas 111, s/223, BR-20031 RIO DE JANEIRO (RJ), Brazilo.

Dum la Universala Kongreso en Bergen fondiĝis nova internacia asocio kun la nomo "Monda Kunagado por Eduko, Scienco kaj Kulturo". Monda Kunagado celas agi per interesaj projektoj sur la kampoj de edukado, scienco kaj kulturo, perante la ideojn de paco kaj internacia interkompreniĝo, kongrue kun la celoj kaj idealoj de Unesko kaj kunlabore kun ĝi. Por publikigi siajn ideojn kaj projektojn, Monda Kunagado eldonas la revuon *Monda Forumo*. Kiu ŝatas kunlabori, ricevi aliĝilon aŭ ekzempleron de *Monda Forumo* kaj la statuton, informojn pri la projektoj de Monda Kunagado, aŭ iel ajn kontribui al ĝi, skribu al: Ulrich Becker, Kustiner Str. 3, D-O-1092 BERLIN, Germanio.

Haveblas kelkaj numeroj de *La Ligilo*, organo de la Internacia Asocio de Blindaj Esperantistoj, en brajlo, por tiuj, kiuj volas havi ilin. Kontakto: Roan O. Stone, Rt. 1 Box 46-C, Hallsville, TX 75650.

La Bruno Gröning-amikaro krom en diversaj eŭropaj lingvoj nun eldonis informilon ankaŭ en Esperanto. La Bruno Gröning-amikaro disvastigas la saniĝodoktrinon de Bruno Gröning (1906-1959). La sukcesoj ankaŭ ĉe nekuraceblaj malsanoj estas konfirmataj fare de kuracistoj. La informilo estas havebla ĉe: Detlef Meier, Marktplatz 8, D-W-6050 OFFERNBACH, Germanio.

U.S. JUNK FOOD AND SOME GOOD STUFF

by Doug Portmann

This is a continuation of the third article in this series, which appeared in *Esperanto U.S.A.* 1991(1). The last couple of columns dealt with scientific and technical vocabulary in Esperanto. This subseries will deal with something a little closer to home: food. In future articles I will offer Esperanto translations of many types of popular American foods, or junk food, to be precise. But in this article I am approaching the problem from the Esperanto side, and will deal with just four troublesome Esperanto words: *biskvito*, *flano*, *krakeno*, and *kringo*.

Perhaps these words could be dismissed with a wave of the hand, as trivia. However, these words all belong to the Basis of Esperanto (*Fundamento de Esperanto*), the cornerstone of Esperanto vocabulary. Thus, they are words selected by Zamenhof himself in the early years of Esperanto.

The following abbreviations for languages are used below: A. English (la angla), F. French, G. German, R. Russian.

First, *biskvito*. According to the *Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto* (Complete Illustrated Dictionary of Esperanto), otherwise called PIV, a *biskvito* is a "speco de pano aŭ de kuko, dufoje aŭ longe bakita, ĝis plena sekeco". That is, it is a type of bread or cake that has been doubly baked or baked for a long time, until it is completely dry. The *Fundamento* gives these equivalents in other languages: A. biscuit, F. biscuit, G. Zwieback, R. biskvit. If we could simply say that *biskvito* is A. biscuit, there would be no need to deal with this word at all. But Zamenhof, a European, would have had the British "biscuit" in mind. In British English, a biscuit is 1) a cookie, or 2) a cracker. Which one did he mean?

Butler in his *Esperanto-English Dictionary* opts for cracker, and I think he's right. German "Zwieback" means rusks—dried crisp bread, sometimes sweetened. French "biscuit" has the same ambiguity as British English. However, this term was limited by the French editors of the *Fundamento* to only the sense of A. cookie. What about the Russian "biskvit"? Two Russian sources agree: "biskvit" is sponge cake! I don't know

much about cooking, but a sponge cake is hardly dry. How Zamenhof decided that R. biskvit is an equivalent to the French-English terms is a mystery to me.

PIV also has a "mar-biskvito", which may be translated as hardtack in English. (This is the tough cracker Union soldiers ate during the Civil War.) Both A. F. biscuit and G. Zwieback mean something doubly baked, unlike cookies. Furthermore, Esperanto already has a separate word for cookie, namely *kekso*. Perhaps *biskvito* could also be retained for very dry cookies, like the ginger snap (*zingibra biskvito*).

Next is *flano*. Should we reach for the nearest English word available, namely "flan"? This is a little-used word referring to pastry dough, especially when it is used as a shell for fruits. However, PIV gives a different definition to *flano*: "ĉia plata, rondforma bakaĵo el pasto" (any kind of round baked good made from dough). Butler warns that *flano* means different things in different European languages, and so it does. He gives "very thin cake or wafer" as a translation, which agrees with the use of the word in the Esperanto edition of the Bible. The *Fundamento* gives these translations: A. flawn (sic), F. flan, G. Fladen, Plinse, R. blin. French "flan" means custard. Russian "blin" means pancake. PIV gives *blino* as translation for R. blin, so evidently the Russian pancake was felt to be distinctive. (Esperanto has other words for pancake.) German "Fladen" is a round flat dough cake. Wells in his *Esperanto Dictionary* proposed "(thin, flat) pastry; griddle cake, dropscone, backed-custard tart" as British English translations.

Evidently the broadness of the PIV definition gives us liberties to freight this word with various English quasi-equivalents, especially if we don't limit ourselves to just baked goods. And since it is a word from the *Fundamento*, why not put it to work? Possible translations are: 1) griddle cake, 2) pie crust, 3) flan, 4) small thin cake or wafer, 5) *toasta flano* = English muffin, crumpet, 6) *itala flano* (*pico*) = pizza, 7) *meksikia flano* = tortilla, and perhaps 8) *brita flano* = scone, although scones are supposed to be triangular. A broad interpretation can come in

handy and eliminate the need for neologisms. In the case of (6), the Supplement to PIV (PIV-S) already has *pico* as the translation of A. pizza, so I would not wish to foist an *itala flano* on anybody.

Next is *krakeno*. PIV has this definition: "malgranda, seka, sukerita kuko, kiu krakas sub la dentoj" (a small, dry, sugared, crunchy cake). The *Fundamento* has: A. cracknel, F. craquelin, G. Brezel, R. krendel. *Krakeno* is probably related to the Esperanto root *kraki*, meaning to crackle or crunch. Its English translation may puzzle some readers. A cracknel is an old English word for a hard brittle biscuit. The French word has approximately the same meaning. But the German and Russian terms both mean pretzel. If I were writing this article a few years ago, I might recommend "pretzel" as a good English translation, in spite of the PIV definition. But since then I have seen three Esperanto dictionaries, two of them German, which list *breco* (a neologism not found in PIV or PIV-S) as the translation of G. Brezel and hence of A. pretzel.

Simply to leave "cracknel" as the only translation for *krakeno* is to let a good *Fundamento-radiko* go to the dogs. (Who eats cracknels?) Why not freight it with new meaning? In accordance with the liberal PIV definition, I suggest 1) cracknel, 2) Graham cracker, 3) *maiza krakeno* = caramel popcorn.

An alternative would be to ignore the PIV definition and let *krakeno* = cracker, a tempting idea in view of the similarity of the two words. Two Esperantists of a small group I surveyed favored this meaning for *krakeno*. This would make sense if *biskvito* = cookie, contrary to what I recommended above.

Finally there is *kringo*. The PIV definition is "malgranda seka sensukera kuko, plejofte ringforma" (a small dry unsweetened cake, usually in the form of a ring). The *Fundamento* has: A. ring-shaped cake, F. gimlette (pâtisserie), G. Kringel, R. bublik. Apparently Zamenhof got *kringo* from G. Kringel. What's a *Kringel*? Unfortunately, the German dictionaries I consulted are not very enlightening. One has "cracknel", and the other refers to some food—ap-

parently unsweetened—in the shape of a ring. The French “gimlette” is also ring-shaped, and apparently a pastry. Russian *bublik* is a “thick bagel”. Neither the English nor the German definitions help us much, while the French definition contradicts PIV. It’s the Russian definition that hints at something important. Why not let *kringo* = bagel, seeing as there has been no good equivalent to “bagel” up to now in Esperanto? This would do away with the need for the neologism *bejgelo*. This neologism is used by the still unpublished *Comprehensive English-Esperanto Dictionary* (CEED). One might even go further and create a *suker-kringo*, a donut.

As you can see, a few rusty old Esperanto root words can go a long way. If we continue to recklessly borrow new Esperanto root words from the ethnic languages, the cost is a loss in the ease of

learning Esperanto. Hence, why not recycle? You can also see why Esperanto lexicographers have a tough job with slippery root words, of which there are only a few. And finally, the foregoing discussions shows that the words for various kinds of food are not very international—even within the same language.

[*Rüdiger Eichholz, Estro de Sekcio pri Fakaj Vortaroj en la Akademio de Esperanto, vidinte presprovaĵon de la supera artikolo, en letero al la redaktoro aldonas la jenan komenton. S-ro Eichholz kunsendis la Pekoteko-informojn pri krakeno, kringo, kaj breco/brecelo.*]

Denove Doug Portmann sendis al vi bonan kontribuon, sed unu gravan detaleton li ne estis rimarkinta, nome ke P[lena] I[lustrita] V[ortaro] atribuis la

difinon de la PV-a “kringo” al “krakeno” kaj tiun de la “krakeno” al “kringo”. D-ro E. Brent forte protestis en sia prelego “Esperantologio” (57-a UK en Portlando—programo 322 de la [UEA] Magnetofona Servo) kontraŭ tiu malrespekto fare de PIV al jam establita lingvo-uzo kaj li rekomendas uzi ambaŭ vortojn laŭ la malnova PV difino, sur kiu baziĝas la plej multaj etnolingvaj Esperanto-vortaroj. Brent pravas, tial Portmann ne timu traduki “krakeno” per *cracker*. “Kringel” laŭ miaj Germanaj vortaroj signifas “eta cirklo” kaj tial oni nomis ankaŭ cirkloformajn kuketojn “Kringel”. Bedaŭrinde oni ne indikas, ĉu tiuj “Kringel” estas dolĉaj aŭ ne. Laŭ mia sento “kringo” devus esti dolĉa kaj ne-krakanta, dum “krakeno” estas nesala kaj krakanta.

Vi do vidas, la diskut-eblecoj estas senfinaj.

1991-A E.G.I.-KONFERENCO OKAZAS EN FLAVAŝTONO- NACIPARKO

de Edveno Grobe

La 6-8an de septembro, en Flavaŝtono-Naciparko, en ŝtato Vajomingo, okazis 1991-a kunveno-konferenco de Esperanto-Grupo Intermontara (E. G. I.). Ĉeestis ĝin geesperantistoj el ŝtatoj Arizono, Kalifornio, Nebraska, Nov-Meksikio kaj Vajomingo.

Duformataj estis la kunvenaj okazintaĵoj. Unuformate, la ĉeestantaro kunpromenadis per buso tra la tuta parko sub la sperta ŝoforado-gvidado-komentado de Rikardo Ranc, parka deĵoristo kaj esperantisto kiu konceptis, organizis kaj estris la semajnfinan aventuraron.

Dum la diversaj perbusaj esploradoj, Rikardo senalce atentigis, nomis kaj priskribis, ĉiam esperantlingve, la dudekojn da montoj, riveroj, lagoj, akvofaloj, fontoj, gejseroj, glacimontoj, insuloj, bestoj, birdoj, insektoj, arboj, arbustoj, kaj floroj kiujn preterpasadis la pasaĝeroj. Estis vera veturanta klasĉambro, tiu luita buseto, en kiu la vojaĝantoj faris valorajn lecionojn pri geologia, besta, planta kaj homa historio

de la parka regiono.

Duaformate, la formala konferenco mem okazis en Konferenca Salonego de Mammoth-Hot-Springs-Hotelo en la norda parto de Flavaŝtono-Parko, proksime al Vajomingo-Montano-ŝtatlino, la posttagmezon kaj la vesperon de la 7a de septembro. El inter la diversaj interesegaj programoj havigitaj al la ĉeestantaro, mi precipe deziras atentigi la jenajn:

1. Usona ĉefdelegito de UEA Bill Harmon (kaliforniano) parolis pri la nuntempa stato de Esperanto-movado en diversaj partoj de la mondo, sed precipe en Ĉinio, Afriko, Orient-Eŭropo kaj Brazilo.

2. Edveno Grobe, redaktoro de Arizona Stelo kaj lastatempe emeritiĝinta profesoro pri la franca, komparis lingvouzadojn de francparolantaj geesperantistoj kaj anglaparolantaj geesperantistoj.

3. Rikardo Ranc, deĵoristo de Flavaŝtono-Parko kaj organizinto de la konferenco, laŭtlegis bondezirajn leterojn el malĉeestantaj E.G.I.-anoj kiujn malsano aŭ familiaj devoj forestigis disde la parkaj okazintaĵoj.

4. Lusi Harmon, estrino de kalifornia esperantlingva vojaĝservo, vidigis

belegajn diapozitivojn pri afrikaj bestoj kaj birdojn kiujn ŝi fotis dum lastatempaj vizitoj en naciaj parkoj de Kenjo, Tanzanio kaj aliaj afrikaj landoj.

5. Madge Silia and Tina Seastrom (nov-meksikianinoj) lernigis al konferencanoj folklorajn dancojn el diversaj landoj, tiom entuziasmigante la gelernantojn ke hotela deĵoristo devis eniri la dancĉambrom kaj peti, ke oni malpli bruegu.

6. Rikardo Ranc lernigis al la konferencanoj du kantojn komponitajn de li precipe laŭteme de la konferenco dum Edveno Grobe akompanis ĉepiane la florisojn.

Senescepte, la konferencaj partoprenintoj multege ĝuadis la tri-tagan aventuron kaj foje refojade dankis Rikardon Ranc-on pri la plurmonatdaŭraj laboroj kiujn li tiom pacience entreprenis kaj sukcesigis por ke E.G.I. havu valoran neforgeseblan konferencon. Ĉiuj el ni nepre ŝuldegas al li senfinajn dankadojn. Li pli rajtas fieri pri si, ĉar sola kaj sole li havigis al ĉiujn ĉeestantojn novan admiron pri la kunbeleco de sovaĝa naturo kaj lerta homaro, pro tio ke la evoluiĝo de ĉi tiu dua eliris el la prafonto de tiu unua.

—El *Intermontara Eŝo*, aŭtuno 1991

PRI TERMINOJ

de Rüdiger Eichholz

[Rüdiger Eichholz estas i.a. Direktoro de la Sekcio Teknika Vortaro de la Akademio de Esperanto. Jen li reagis pri temo tre aktuala (vidu ankaŭ diversajn komentojn de Doug Portmann, Anna Löwenstein, W.P. Patterson kaj mi mem dum lastaj jaroj).]

La opinioj esprimitaj en letero al redaktoro *Esperanto U.S.A.* 1991(4), p. 10, de s-ro W.P. Patterson incitis min al reago, ĉar ili estas tipaj por Esperantisto, kiu ne konas la problemojn, kontraŭ kiuj ni devas barakti. Generale mi konsentas, ke Esperantistoj devus utiligi pli la latentajn kapablojn de nia lingvo kaj prefere krei terminojn por novaj nocioj per kunmeto de jam ekzistantaj radikoj, anstataŭ facil-anime enkonduki novajn vortojn per apliko de la 15-a regulo. Tamen bonaj terminoj devas plenumi multajn postulojn:

Unue ni devas atenti, ĉu proponata termino ne jam ekzistas kun alia intermiksebla signifo en nia lingvo. La modernan telefaksan aparaton s-ro Patterson proponas nomi "faksimililo". Tio ne eblas, ĉar la radiko "faksimil" jam de multaj jardekoj hejmiĝis en nia lingvo, ĝi estis registrita en la unua Oficiala Aldono al U.V., kiel PV kaj PIV montras. Ĝi signifas: "Ekzakta reproduktaĵo de skribo, desegno". Kiel tiu reproduktaĵo estis akirita ne estis difinita. Hodiaŭ oni uzas fotokopian procedon, sed kiam la termino en la 19-a jarcento aperis, oni uzis komplikitan fotografian procedon. La kapablo sendi faksimilojn per drato aŭ ondoj, tiam ne ekzistis. Utiligo de tiu kapablo certe devus ricevi apartan nomon: "telekopii" kaj "telefaksi" estas nuntempe uzataj kaj ŝajnas al mi taŭgaj. La tekniko, kiun s-ro Patterson menciis, nomiĝas kun plena nomo en la Angla "facsimile transmission" (faksimila dissendo). Sed Angla-lingvanoj kutimas mallongigi tiajn terminojn, kaj se oni tradukas mallongigojn, oni povas veni al la erara konkludo, ke "tele-" ne estas bezonata.

Due oni devas atenti la vort-kategorion, al kiu oni volas aldoni sufikson. "Faksimililo"

estas erara ankaŭ pro tio, ĉar "-il/" montras la instrumenton, aparaton aŭ organon servantan por plenumi la agon esprimatan de la radiko. "Faksimil" estas substantiva radiko, kiu ne esprimas agon, tial oni ne povas aldoni al ĝi la sufikson "-il"!

Jes, per reklamado oni facile enkondukas en la Angla novajn vortojn kiel "laptop", "palmtop" kaj "notebook computer".

kiu "-er/" estis aldonita, estas la verbo "malpurigi". Por tiu verbo "-er/" ne povus esti konsistiga elemento. Do la termino devus esti "malpurigaĵero". Tiu termino ŝajnas al mi tro peza por praktika apliko. La proponon de Portmann "poluenzo" por "pollutant" mi nepre preferas.

Se ĉiu Esperantisto proponus tiajn terminojn, ni misuzus la de s-ro Patterson menciitan "ekkrakantan fulmon de Esperanta potenco" kaj baldaŭ ni ne plu komprenos nin. Aliflanke ni bezonas tiom da terminoj, ke estus dezirinda, ke pli da lingvo-sciantoj faru proponojn. Por eviti, ke enkondukiĝos maltrafaj terminoj, oni prezentu ilin en facile kritikebla maniero, tiel, ke ĉiu rajtas aldoni rimarkigojn. Tiucele mi ellaboris la Pekoteko-sistemon. Por traduki "laptop" mi jam publikigis en 1989 jenan registraĵon, al kiu mi ĵus aldonis terminojn por "palmtop" kaj "notebook computer". Do mi petas viajn reagojn al la termino-proponoj en komplekso 89/1.5.1.

Se iu havas proponon por novaj terminoj, por nocioj por kiuj ŝi aŭ li ne povis trovi Esperantajn terminojn, tiu prezentu tiujn proponojn al mi. Mi registros ilin en Pekoteko kaj vaste dissendos la registraĵojn en elektronika kaj presita formoj. Akademias Studoj 1988-1990 (560p, US\$15.00 + 3.25 por sendokostoj) enhavas 480 tiajn registraĵojn, kaj la duvoluma "Plena Pekoteko 1955-1990", kiun mi nun preparas por eldono, enhavas kelkajn milojn da ili. Al tiu verko, kies eldonon la FAME-fondaĵo subvencii, estos aldonitaj Esperantaj, Anglaj, Francaj kaj Germanaj indeksoj kaj ampleksa enketilo por objektiva esploro de la preferoj de nia popolo. Tiel ĉiu Esperantisto havas la eblecon, facile konsulti la verkon kaj kontribui ion al la evoluigo de nia lingvo.

Rüdiger Eichholz
Esperanto Press
Baillieboro, Ontario
Kanado, KOL 1B0

^E	
{U.1}	681.32
{T.1}	KDB
{Eo.1}	sur'femur/a komputor"/et/o *a
{Eo.2}	laptop"/o *a
{Eo.3}	not-libr/a komputor"/et/o *a
{Eo.4}	man-plat/a komputor"/et/o *a^R
{De.1}	mobiler Mikroechner m *ĉ^AR
{En.1}	laptop computer *b
{En.2}	laptop *c
{En.3}	notebook computer *e
{En.4}	palmtop *f^R
{Fr.1}	^AR
{Ni.1}	schootcomputer *d^AR


Portebla komputoreto pezanta malpli ol 5 kilogramojn, kiu havas propran kurento-provizon. -oj utiligas ordinarajn pilojn aŭ reŝarĝeblajn bateriojn. Se ret-kurento estas havebla, transformilo por alterna kurento provizas la bezonatan rekt-kurentan tension. La vidigiloj de -oj estas kutime likrivoj (85/460). Ĉar intertempe oni produktis ankoraŭ pli malpezajn komputoretojn, kiujn la fabrikintoj baptis {En3} kaj {En4}, mi proponas por ili la terminojn {Eo3} kaj {Eo4}. {Eo3} estas komputoreto, kiu pezas malpli ol 3,6 kg kaj kiu ne estas pli granda ol not-libro. {Eo4} estas tiel malgranda, ke neniu suspektus, ke temas pri plenkapabla komputoro: Vi povus teni kaj funkciigi la aparaton sur via manplato. La sternapo (85/440) Lotus 1-2-3 troviĝas en la aparateto sur rom-ĉipo (85/473). Malavantaĝo de tiel eta komputoreto kompreneble estas, ke ĝia klavaro estas tro malgranda por ebligi konvenan klavadon. *a laŭ *b*e*f
Fon: *a eĵ; *b ComGlo; *c PeCo89/11; *ĉ CE; *d esinWood[eĵ]; *e BYTE9.1/2; *f BYTE9.1/5;
89 / .1.5.1.

Rlm: «91-07-27»

Termino-Propono el Pekoteko

Tiuspecaj vortoj rapide internaciĝas, kaj por ili ni devos trovi taŭgajn Esperantajn terminojn. La proponita "komputileto" evidente ne estus sufiĉe preciza por distingi inter tiuj tri specoj de porteblaj komputoretoj. "Pakajkomputilo" tute ne estas komprenebla por mi. Kial "pakaĵo"? Ĉu ne ĉiu varo, kiun oni aĉetas, estas kutime liverita en pakaĵo? Do la kreataj terminoj devos provizi iun memorhelpon.

Ankaŭ "malpurigero" ne estis bone formita: "-er/" laŭ PIV estas "unu el konsistigaj elementoj de tutaĵo". La vorto, al



LETEROJ

[Note: The letter column is a free-speech forum for members of ELNA. Views expressed are not necessarily those either of the editor or of the Esperanto League for North America, Inc. Comments for publication may be sent either to the address of ELNA or to Don Harlow (EUSA), P.O. Box 551, Pinole, CA 94564.]

[Mark Stephens is a former Director of the ELNA Central Office and a recently-elected member of the Board of Directors.]

I must admit that the news I just received regarding the Board of Directors decision, and the ratification by the [ELNA] Congress, to raise various membership rates is very disturbing to me.

For almost four years I fought to keep membership rates low based on the assumption that more members buy more books, subscribe to more periodicals and make more donations, thus increasing the level of income that ELNA has at its disposal to carry out its various programs.

Another reason for keeping membership rates low was to maintain ELNA's attractiveness as an organization. Simply put, ELNA must compete economically and in terms of services provided with the various local and special interest Esperanto groups as well as the Universala Esperanto-Asocio. Some will argue that it's all for Esperanto, but the fact is that many of us cannot afford the large sums of money it takes to participate on the local, national and international levels.

ELNA has been fortunate to have a very strong and positive growth in the previous few years. This was not by luck but by planning and a lot of hard work. Even though ELNA experienced a positive growth again this year, the Gulf War and the worsening economy made this one of the most difficult membership drives I have managed. While the War is over (at least for now) and the economy is showing some signs of recovery, now is not the time to raise rates.

First, UEA's rates are going up again. This is a big mistake considering that they are trying to set record goals in membership. This will also place a lot of people in the difficult position of choosing between joining a national or international Esperanto organization.

Second, while working in the C.O. we were able to significantly reduce the cost of supplying a member with the various services. This was due to a lot of planning, shopping around, and the fact that printed material goes down in per unit cost as the quantity produced goes up. The board should be looking for other sources of income, not raising the "Esperanto Tax" as membership rates have been called in the past.

I might be wrong. ELNA might experience another year of positive growth and I hope we do, but I fear that this rate increase which ignores the economic concerns of the majority of our members will have an adverse effect on the growth of the Esperanto movement in the United States.

Mark C. Stephens

[My own feelings about the dues increase are ambivalent. There are two points worth noting: (1) ELNA has not had a dues increase in the past ten years (and how many other national organizations can make this boast?); and (2) the ELNA Congress, attended by some eight percent of the membership, voted almost unanimously to accept the dues increase.]

Permesu al mi ioman malfruigintan reason al via RECENZE en *Esperanto U.S.A.* de 1990(7), p. 13. Unue, mi estas dankema, ke vi recenzis faklibrojn, kiuj alie apenaŭ ricevis atenton en Esperantujo. Due, aparte interesas min via observo pri "rapideco" kaj "velocito". Tiu demando delonge donas al mi problemojn. Ekzamenado de aliaj etnaj lingvoj montras neunuforman distingon inter la konceptoj por rapido / velocito. Mi mem iam ludis kun la ideo enkonduki "veloco" (= velocito). Sed mi ne estas eksterdube persvadita, ke necesas tia neologismo. En la nuna malneto de mia eldonota "Internacia Kemia Vortaro" enestas ebla traduko "rapidvektoro" por A. velocity. Cetere, mi opinias, ke frue malfrue Esperanto bezonos preskaŭajn sinonimojn por nia troŝargita popola adjektivo "rapida".

Doug Portmann

[Por tiuj, kiuj ne scias, la diferenco inter la anglaj speed kaj velocity estas, ke la unua havas nur grandecon (teknike, ĝi estas skalaro), kaj la dua enhavas ankaŭ direkton (do estas vektoro). Aparte plaĉa estas la ideo diri "rapidvektoro" por velocito, ĉar tiel ĝi kvazaŭ enhavas la propran

difinon.]

Ĝus mi ricevis mian ekzempleron de la "Literatura Suplemento", kaj ekrimarkis miajn donitaĵojn! Tre plaĉas min, kaj dankojn. Ekposte mi rimarkis, ke, Ho Ve! al la "Kaleŝeto" mankas kapo! Preskaŭ la unuaj 2 (el 5) [manuskriptaj] paĝoj forflugis kun la preskoboldoj. La restaĵo estas memstara iasence, tamen la enkonduko ankaŭ valoras. Domaĝe. Sed, faru vian plejbonan pri tio.

Kiam espere aperos alian eldonon de la "Suplemento"? Post reagoj, sendube.

Mack Dougherty

[En tia kazo de eraro, al la preskoboldo preskaŭ certe apartenas la inicialoj DJH; nome, se al "Kaleŝeto" mankas kapo, tio okazas, ĉar al la redaktora kapo mankis [espereble, nur provizore] klapo. Mi provos reaperigi la tutan poemon en estonteco. Pri alia suplemento: malgraŭ miaj redaktistaj rimarkigoj en 1991(5), ŝajnas al mi, ke en Raleigh la Estraro indikis, ke estontece oni devos elekti inter sepa numero de EUSA kaj unu Suplemento. Antaŭ ol decidi pri tio por estontaj jaroj, mi volus aŭdi la opiniojn de la anoj de ELNA. Ĉu EUSA? Ĉu Suplemento? Ĉu ambaŭ?]

I have been pondering the terminology used by many to describe Esperanto and have come to a few conclusions. Esperanto is commonly labeled an artificial language. The term *artificial*, by most definitions, refers to something that lacks natural or spontaneous qualities. It can also mean man-made, but usually in reference to social, economic, or political subjects. The common connotation is "an imitation." Esperanto is in no way an imitation of a language. It has all the life of other languages. In fact, Esperanto sometimes surpasses *real* languages; it has more freedom, expression, and euphoria.

Apparently, the wrong term is being used to describe the International Language. Could this be one reason why misconceptions flourish? To be accurate, Esperanto could be called the Articulate Language.

Articulate signifies clear, effective, ready expression. *Articulate* also describes something that is freely, yet securely, connected. Esperanto certainly fits these definitions. Perhaps, in order to be more precise, we should henceforth refer to Esperanto as the Articulate Language.

Jacob Schwartz

[A certain amount of care often has to be taken in referring to Esperanto; see your own laudatory comparison of Esperanto

with real languages, for instance (*Esperanto is areal language*). Prof. Ivo Lapenna insisted—in the Principaro de Frostavallen, if I'm not mistaken—that *Esperanto should never be referred to as an artificial or auxiliary language, but always, simply, as the International Language, with capital letters.*]

[Conrad Fisher estis Sekretario de ELNA dum la periodo 1954-1971. En tiu tempo, ne ekzistis Centra Oficejo, kaj la Sekretario sensalajre plenumis multajn el la respondecoj, kiujn nun havas la Direktoro de la C.O. Li hodiaŭ faras similan laboron por la Internacia Societo de Amikeco kaj Bonvolo.]

Surpaĝo 3 de *Esperanto U.S.A.* 1991(4) estas misinformo pri mia dumviva membreco. Eble vi devus pravigi tion en la posta numero, por ke la ELNA-anoj kaj aliaj legantoj sciu.

Kiam mi estis la sekretario de ELNA Armin Doneis proponis al la Estraro de ELNA, ke ĝi *donacu* al mi tiun membrecon. Inter liaj vortoj estis la esprimo "for action above and beyond the call of duty".

Laŭ mia scio, tiu estas la nura fojo, kiam dumviva membreco riceviĝis sen monopago. Kompreneble, mi ĉiam ĝojas, ke mi tiam povis helpi al nia Ligo.

Conrad Fisher

I would like to comment about what direction Esperanto should take in the formation of new words. Perhaps people don't stop and think that every national language had to deal with this problem. A few languages have rejected all foreign roots, but I'm afraid if we paraphrased and recombined existing Esperanto roots for every new word, the language might look ridiculously artificial, especially with scientific terms.

Many languages have absorbed foreign words. If not carried to extremes, I don't think foreign words will damage Esperanto, although whose words will be adopted, probably will not be resolved by decree.

I dislike the tendency to dream up "needed" suffixes and word endings. Esperanto is not a mental exercise or game. Maybe they would be happier studying an old "improvement": Ido.

Barry Merrell

[See various articles on terminology in this issue.]

Mi ĝuis la artikolon en Literatura Suplemento pri la 5a kongreso de EANA en 1912, sed mi devas riveli miajn pensojn

pri la Esperanta movado. Mi scias, ke multaj esperantistoj kritikos min pro ĉi tio.

Mi havas grandan entuziasmon pro Esperanto. Sed pacifismo estas ofte kombinata kun la principoj Esperantaj. Jes, mi scias, ke d-ro Zamenhof volis pacon, kaj li kreis Esperanton por helpi la mondpacan movadon. Mi estas ne pacifisto. Mi neniam estos pacifisto. Homa naturo estas detruita, mortigi. Nia monda loĝantaro nombras kvin miliardojn. La nombro iĝas pli granda. Estas ne eble, ke ne unu persono el la kvin miliardoj dum "mondo-paco" ne havus militan deziron. Do, mi ne rekomendas pacifismon. Mi estas esperantisto, ĉu ne? La artikolon deklaras: Esperantisto estas konstanta malamiko de la militado. Ĉu mi ne estas esperantisto?

Mi pensas, ke Esperanto estas monda lingvo. Se ni ĉiuj parolus Esperanton, la tuta mondo, tiam Esperanta vera intenco estus plenumita. Paco eble estas bona flank-efiko, sed la ĉefa intenco estas kompletiga.

Jamie Schneck

[*Malgraŭ la belaj vortoj de s-ano Dowson—li faris sian paroladon antaŭ la Unua Mondmilito—la historio de la nuna jarcento montras, ke la plimultaj esperantistoj ne estas senpensaj pacifistoj; vidu ekz. la verkon La danĝera lingvo de Lins por ekzemploj. Sed, eble malpli ol aliaj homoj, ili ne emas senkritike militi. Cetere, eĉ militisto povas esti esperantisto; mi memoras junan kapitanon en la usona aerarmeo, kiu preskaŭ ĉiusemajne partoprenis en la kunvenoj de la Londona Esperanto-Klubo. Pri tio, vidu ekz. la Deklaracion pri Esperantismo (Bulonjo, 1905), kies kvina punkto parte tekstas: "Esperantisto estas nomata ĉiu persono, kiu scias kaj uzas la lingvon Esperanto tute egale, por kiaj celoj li ĝin uzas."*]

[Thomas Eccardt is President of the Esperanto Society of New York. In a cover note, he points out that the ideas herein presented are his own, and not necessarily those of the New York group.]

Few Esperantists recognize two fundamental problems inherent in spreading Esperanto or any other invented international language: isolation and inertia. When we speak Esperanto, we cut our message off from those who don't understand the language. And when people do decide to learn Esperanto, unless they put a lot of time and effort into it, they won't succeed. For Esperanto is still a language, no matter how it compares to other languages.


Perhaps it is time to reconsider the structure of the Esperanto Movement in the light of the above. It is the [Esperanto] Movement's duty to Esperantize the world, and this will not happen by government fiat. Yet the major Esperanto associations around the world are not organized to do it. They ignore a fundamental fact of Esperanto: it is more than an ideology or an organization, it is a language and part of life.

Esperanto Associations currently are organized like many national organizations, such as National Geographic. If you pay dues, you receive your newsletter and you're a member. But you're not an Esperantist unless you speak Esperanto. And you can't learn Esperanto simply by being a member of ELNA. You learn Esperanto by speaking it with other people, locally, often in a club. Clubs are currently almost the only opportunity Americans have to speak Esperanto, since it is not used in business, schools, religions, etc. And we cannot rely on families to spread Esperanto, since they are not very successful even in handing it down. If ELNA and other Esperanto organizations are to grow, they must recruit people at the local level—through clubs.

Actually, the current structure is an ideal starting point. If there were no ELNA or UEA, only clubs, then the job would be difficult and the resultant superstructure might be a loose confederation of clubs. The current superstructure has its informational, lobbying, and other tasks, and these will always be with us. What is needed is closer contact between the clubs and ELNA. Ideally, the clubs should be chapters of ELNA, with a certain degree of autonomy to adjust policies to local needs. But we should let the experience of ELNA people and resources trickle down to the clubs, and the experience and resources of the clubs should percolate up to ELNA as well.

What should be trickling and percolating? For one thing, information on how to recruit, educate and retain members should be exchanged between clubs and ELNA. This could be accomplished by a periodical published by ELNA for the benefit of clubs. It could include contributions by both ELNA people and the clubs' officers and members. From time to time, it should be collected into an anthology or club guidebook on how to start your own chapter of ELNA. Other topics could include community resources, by-laws, publicity, non-profit status, the media, and links to other local organizations.

There may be financial or legal impedi-



VOJAĜU ESPERANTE EN 1992

Esperanto-Kursoj ĉe SFSU
June 29-July 17
 "The Best in the World"

ELNA Convention
July 18-22
Berkeley, California

Berkeley, Oakland, El Cerrito, Richmond, Martinez, Concord, Pinole...all cities of the "Mysterious East Bay" fought hard and won the honor of hosting the 1992 ELNA Convention. The location will be the Foothill Housing Complex of the University of California, Berkeley, located on the uphill corner of UC's

campus, which is one of the most, if not the most, interesting campuses in the United States.

There is plenty to see on the east side of the bay: Oakland's Museum is the best of its kind in the country; the university museums are great; and touring this part of the world is a treat.

The price is right, the location attractive, and local Esperantists are eager to host samideanoj from around the world. Watch for the official registration sheet from ELNA early next year.

Universala Kongreso de Esperanto
July 25-August 1
Vienna, Aŭstrio

The 77th UK takes place in a time of great and fundamental change in all of central Europe, and due to Vienna's central location, will attract a great many Esperantists from that area. For a number of reasons UEA had to change the original plan naming Prague; but you can visit Prague after the UK.

Vienna is a cosmopolitan, sparkling city yet small enough to be knowable and easy to get around in. Esperanto Vojaĝ-Servo has located two hotels in Vienna, very reasonably priced and conveniently located. It will be easy to get to the Kongresejo and into the city center.

The Kongresejo will be at UNO City, the home of the United Nations in Vienna, just across the Danube from the old city. It is one of the most

modern and beautifully-equipped convention centers in the world.

Post-kongresa Ekskurso
August 1-10

Hungary & Czechoslovakia
 Visit beautiful Bratislava, Budapest, Tatry Mountain area of Slovakia, Brno, PRAGUE. A great trip visiting Esperantists along the way.

5a Pacifika Konferenco
August 17-22
Qingdao, Ĉinio

Qingdao is a center of Esperanto activity, and the preparations for a cultural feast are near completion. The price will be right! A number of pre-and post-congress excursions will be offered, including a cruise on the Yangtze River and a trip to exotic Tibet.

It will be difficult to choose between Vienna and Qingdao—but you should seriously consider taking part in one or the other if at all possible.

Esperanto Vojaĝ-Servo
6104 LaSalle Avenue
Oakland CA 94611
(510) 339-2001

Detailed information about the UK, our post-UK excursion, Qingdao and its related excursions will be mailed to everyone who has traveled with Esperanto Vojaĝ-Servo. The mailing will go out early in January. If you have moved or are not on our mailing list, please call right away.



President: Angela Harlow (1993), P.O. Box 551, Pinole, CA 94564, tel. (510) 222-0187
 Vice President: Dr. Grant Goodall (1993)
 Secretary: Virginia Stewart (1992)
 Treasurer: John B. Massey (1994)
 Other Board Members: Prenda Cook (1992), Frank Helmuth (1992), Dr. Jonathan Pool (1992), Dr. E. James Lieberman (1993), Sherry Wells (1993), David Wolff (1993), William R. Harmon (1994), William H. Schulze (1994), Mark C. Stephens (1994)
 Commissioners: John Dale (Legislative Affairs), Jim Deer (Tape Service), Lucy Harmon (Travel Affairs), William R. Harmon (Central Office), Dorothy Holland-Kaup (Correspondence Courses), R. Kent Jones (Science & Technology), Dr. Julius Manson (United Nations), John B. Massey (Wills and Gifting), John B. Massey, William H. Schulze and Sidney V. Steinberg (Kapitala Fondusa Komitato), John Mathews (Service Clubs), Catherine Schulze (Postal Course)
 Director, Central Office: Mike Donohoo
 Vice-Director, Central Office: Ionel Onet
 ELNA Archivist: Hal Dreyer

Any member wishing to assist in the work of any of the above named commissions or committees should communicate with the member(s) shown.

ELNA Dues for 1992

Regular	\$30
Family	\$45
Youth (under 27)	\$15
Limited income	\$15
Sustaining	\$60
Life	\$600

ELNA is a non-profit organization functioning under IRS paragraph 501(c)3. Donations are tax-deductible.

A separate supporting category, "Friend of Esperanto," has been established. A Friend of Esperanto pays \$10 per year.

Libraries and other institutions can subscribe to *Esperanto U.S.A.* at the special rate of \$15 per year.

UEA dues 1992

Member-Guidebook only(MG)	\$ 8.00
Member-Yearbook only (MJ)	\$18.00
Member-Subscriber (MA)	\$45.00
Societo Zamenhof (additional)	\$90.00
Subscription only to Esperanto	\$27.00
Subscription only to Kontakto	\$14.00
Life Membership in UEA	\$1125.00

Send payments for UEA memberships or sub-

scriptions to ELNA, Box 1129, El Cerrito, CA 94530. Make all checks payable to ELNA.

MOVING? DON'T LEAVE ESPERANTO BEHIND! If you have moved recently or are planning to move in the near future, don't forget to send a change-of-address card to the ELNA Central Office, Box 1129, El Cerrito CA 94530. This will assure your continued receipt of the Newsletter and other information. If you don't have a stamp handy, give the CO a call at (510) 653-0998. Thanks!

DEADLINE FOR MATERIAL FOR ISSUE 1992(2) of Esperanto U.S.A. is February 25, 1992

ELNA Newsletter
Volume 27, No. 7
ISSN 1056-0297
Esperanto League for North America, Inc.
P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530
Telephone: (510) 653-0998
Editor: Don Harlow